

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UT-Dalaso

london, la 2-an de julio, 2012 • numero sep

Hodiaŭaj eventoj

★ 8:45 atm – 12:15 ptm:
Kursoj

★ 12:55 – 6? ptm
Ekskurso al Dalaso

Birke iros kun vi al Dalaso, kie vi povos esplori la urbon laŭdezire. **Kunvenu en la vestiblo je la unua etaĝo.** Por tiuj, kiuj restos, Hoss gvidos ludojn en la gufujo kaj spektigos filmojn.

★ 7:30 – ??? ptm:

Eventoj en la gufujo

Ray parolos pri la plantoj ĉe UTD. Poste sekvos la kutima gufujaj babilado, teo kaj klerigo.



Atentu!

Lernantoj de Spomenka kaj Birke! Hodiaŭ viaj instruistoj interŝanĝos klasĉambrojn!

Pli da teksasaj proverboj

de Johana HOENOW

- Surhavante spronojn, ne kaŭru.
- Bona juĝo venas el sperto, kaj multe da sperto venas el malbonaj juĝoj.
- Neniam piedbatu bovofekajojn en varmega tago.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 4.418
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la "gufujo" en la 4-a etaĝo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 4.418, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Epizodo tri

Jen la tria epizodo de la rakonto pri Savannah, la filino de Johano. Legu la unuan parton en n-ro kvin de la Fasko, "Kio okazas ĉe Savannah?"

de Johano BENTLEY

Kiel vi memoras, mi kaj mia edzino diagnozis la problemon de Savannah, sed eble tro malfrue. Kaj por savi ŝian vidpovon, kaj ja ankaŭ ŝian vivon, ŝi bezonis cerb-operacion.

Mi devus menci, ke dum la tuta afero ĝis tiam, Savannah neniam plendis. Ŝi nur prenis mian manon kaj diris, "Mi amas vin Paĉjo", per sia dolĉa, iom stumblanta voĉo. Fakte, kvankam ŝi havis konstantan kapdoloron, ŝi neniam ploris, kaj nur metis sian kapon sur miajn genuojn, por ke mi povu froti ŝian frunton. Ŝi estis (kaj ankoraŭ estas) tre kuraĝa infanino, kaj kiam ŝi subite blindiĝis, ni sciis tion nur ĉar ŝi mallaŭte diris, "Paĉjo, mi ne vidas vin."

Ĉar ŝia sanstato degeneris tiel rapide, la kuracistino aranĝis rendevuon kun la neŭrologa kirurgo samtage, kaj ni aperis en lia praktikejo tiun posttagmezon. Li diris, ke li volas enmeti la cerbtubon en la kvaran cerbfluujon (kiu nomiĝas "ventriklo"). Tio iom nervozigis min kaj mian edzinon, ĉar krom la cerebela, la kvara ventriklo enhavas ankaŭ la cerbo-bazon, kiu regas la spiradon, koro-rapidon, kaj eĉ la kapablon resti konscia. Se li ion fuŝus, Savannah eble povus eniri komaton, de kiu ŝi neniam vekiĝus.

Li planis operacii en la venonta mateno, kaj Savannah eniris la malsanulejon dum la nokto. Kiam estis mia vico por sidi kun ŝi, mi alportis mian gitaron kaj tre mallaŭte ludis melodion kiel lulkanton. Ŝi enamiĝis al ĝi, kaj poste ne permesis al mi ludi ion alian. Mi ludis tiun melodion ree kaj ree ĝis kiam ŝi endormiĝis.

La venontan matenon, mi kaj mia edzino maltrankvile atendis dum la operacio. Post du horoj, la kirurgo finfine eliris, kaj diris al ni, "Ne zorgu, la post-operacia tomografio montris ke ĉio estas en ordo. Ŝia cerbopremo estas nun normala, kaj mi atendas, ke ŝi estos multe pli bona kiam ŝi vekiĝos."

Ni trankviliĝis pro la bonaj novaĵoj. Tiun nokton, Savannah finfine vekiĝis, kaj ŝiaj okuloj tuj fiksrigardis niajn vizaĝojn.

"Saluton, Panjo kaj Paĉjo", ŝi diris. Ŝi povis vidi denove.

Dum la venonta semajno, Savannah plu resaniĝis. Ŝi devis rampi denove, kaj eĉ provis promeni kelkajn paŝojn. Sed dek tagojn post la operacio, ŝi plendis pri kapdoloro kaj koldoloro. Ni planis porti ŝin al la kirurgo la venontan matenon. Tri horojn poste, je la dek unua, mi aŭdis kriegon de mia edzino el la ĉambro de Savannah.

"Savannah, vekiĝu, vekiĝu!"

Mi kuris laŭ la koridoro, kaj mi trovis mian edzinon, kiu staris kun Savannah en siaj brakoj. Savannah estis senkonscia.

Timante la plej malbonan rezulton, ni rapidegis al la urĝejo. Ili tre rapide portis Savannah-n al tomografo. Ni atendis tre timigitaj ĝis kiam ni vidis la kolegon de nia neŭrologa kirurgo alproksimiĝantan.

"Savannah havas tro da fluo en sia cerbo denove. Mi devos enmeti plian cerbtubon. Tiun ĉi fojon, mi enmetos ĝin en la duan ventriklon, tiel ke mi ne perturbu la alian tubon", li diris.

"Ĉu la alia malfunkciis?" mi demandis.

Stranga mieno aperis sur lia vizaĝo, kaj li rigardis nin dum kelkaj sekundoj antaŭ ol li diris, "Ne, ĝi funkcias tiel bone nun, kiel ĝi funkcias post la operacio."

Ŝajnis, ke la operacio sukcesis, kaj Savannah vekiĝis normale matene. Ŝi restis en malsanulejo por ke ŝiaj kuracistoj povu observi ŝin. Ĉiunokte, mi ludis la lulkanton ree kaj ree, ĝis kiam ŝi ekdormis.

Ŝia kapdoloro kaj koldoloro ne ĉesis dum la venontaj tri tagoj. Fakte, ŝajnis ke

ili pligrandiĝis konstante. Je la tria tago post la operacio, la kirurgo frustre diris ke ŝia stato degeneras denove, sed li ne volis konstante uzi la tomografon por kontroli la cerbon. Tio estas danĝera pro la iks-radioj.

Do, ĝuste tie, en la malsanuleja ĉambro, li enmetis ankoraŭ alian tubon en la cerbon de Savannah, tra ŝia frunto, kaj konektis ĝin al mezurilo por mezuri la premon de ŝia cerbfluo. Mi kaj mia edzino tre ĝeniĝis. Nia filino havis tri tubojn en sia cerbo, kaj unu estis konektita al aparato kiu elstaris de ŝia frunto kiel korno.

Malgraŭ la mezurilo, aŭ eble pro ĝi, la doloro de Savannah pligrandiĝis tage, kaj la kuracistoj ne sciis, kio okazas. Ili donis al Savannah pli kaj pli da sendolorigiloj. La kvinan nokton, mi finis mian kutiman

ludadon de la lulkanto kaj mi eliris el la malsanuleja ĉambro. Mi portis mian gitaron el la ĉambro kaj iris al la lifto, sed ĝuste tiam mi aŭdis hurlon, kiel de sufereganta besto.

Terurite, mi rekonis la voĉon. La gitaro falis forgesita sur la plankon kaj mi galopis al ŝia ĉambro. Vira flegisto estis antaŭ ŝia pordo, kaj provis bari min, sed mi nur puŝis lin flanken kaj eniris la ĉambron. Savannah estis kurbiĝinta fete kun la manoj sur ambaŭ flankoj de la kapo, gapante kaj balanciĝante tien kaj reen.

Kiam ŝi vidis min, ŝi kriegis, "Ĝi doloras! Ĉesigu ĝin, Paĉjo. *Ĉesigu ĝin!*"

(Legu la lastan parton morgaŭ!)

Limeriko

de Gregoro TSEYTSIN

De Bertilo detala klarigo
Venis kun la matena sciigo

Por ni estu pli kleraj

O! Ĉiuj ceteraj

Kaj ne NASK-u la gufon el strigo.



Matías, Brian kaj Mabel pozas kun siaj balonoj. Sendube ili ĵus legis la rakonton *La milito de la ĉapeloj...*